A-PDF Merger DEMO : Purchase from www.A-PDF.com to remove the watermark

# STARTO

N-ro 2/2017 (263)

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



*Lingva Seminario dum la ekskurso en Rudka en la Travivaĵ- kaj palpo-pado*

Tisk a distribuci tohoto časopisu finančně podpořil Kraj Vysočina

## ☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, aperas 4-foje jare.

**Asocia adreso:** Ĉeĥa Esperanto-Asocio, náměstí Míru 81/1, 568 02 Svitavy, **reta poŝto**: cea@esperanto.cz, ces@esperanto.cz.

**Retpaĝaro de ĈEA:** www.esperanto.cz

**Identec-numero (IČ):** 00 44 30 34

**Starto retpoŝte:** starto@esperanto.cz

**Komercaj anoncoj:** 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

**Membrokotizoj:** A 350 Kč (Starto elektronike 240 Kč), B 250 Kč (elektronike 140 Kč), C 100 Kč, P 150 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

**Korespondaj kursoj:** Cink: 400 Kč / 720 Kč (rete / normale); Marček: 600 / 800 Kč; Cink por progresintoj 600 / 1080 Kč. Aliĝoj: Jana Melichárková, Vacenovice 398, 696 06 Vacenovice, melicharkova8@seznam. cz

**Libroservo:** Muzeum esperanta, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, dvor.libuse@seznam.cz, marie.cumova@seznam.cz.

**Sekcioj de ĈEA:** katolika, kristana, blindula, pri informadiko (memstariĝis: handikapitoj, junularo, fervojistoj)

**Komisionoj de ĈEA:** pedagogia

**Muzeo:** muzeagrupo@esperanto.cz

**Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj:** Jarmila Čejková, Malý Koloredov 1538, 738 01 Frýdek-Místek, jarkacejkova @centrum.cz - sufiĉas sendi kopion, skanaĵon, ligon al la gazeta retejo

**BANKO-KONTO de ĈEA:**
2800 186 228/2010
**Fio banka Svitavy**

**Komitato de ĈEA:**

**Prezidanto:** Libuše Hýblová, Bohutín 136, 789 62 Olšany, tel. 774 928 974, libusehyblova@seznam.cz (gvidado, kunordigado kaj reprezentado de ĈEA, eksteraj rilatoj inkl. UEA, EEU)

**Vicprezidanto:** Leonarda Chaloupková, K Panskému poli 160, 251 01 Světice, tel. 732 415 094, leonarda.ch@seznam.cz (laboro kun kluboj kaj sekcioj, subvencioj)

**Kasisto:** Vratislav Hirš, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, tel. 517 444 117, vratislav.hirs@esperanto.cz (membro-datumbazo, kontado)

**Komitatano:** Libuše Dvořáková, Zahradní 2/B, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, libuse.dvorakova@esperanto.cz (Esperanto-Muzeo en Svitavy, rilatoj al la urbo Svitavy, muzea kaj ekspozicia grupo)

**Komitatano kaj redaktoro de Starto:** Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 737 562 479, 530 319 263, miroslav.malovec@esperanto.cz (historio de la movado, kulturo, lingvaj konsultoj, ciferecigado, fakaj aplikoj, pedagogio)

**Komitatano:** Miroslav Hruška, Haškova 2, 638 00 Brno, tel. 608 224 993, miroslav.hruska@esperanto.cz (junularo, ĉefredaktoro de la asocia retejo kaj de asociaj retkomunikoj, komputila klerigado, teknika subteno, redaktado)

**Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio:** Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel. 257 712 201, chrdle@kavapech.cz

**UEA-kotizperanto:** Ĉeĥa Esperanto-Asocio. La pagojn sendu al la konto de ĈEA (vidu paĝon "Jak platit svazu"). Administras: Petr Chrdle (kontaktojn rigardu en la antaŭa alineo).

**Esperanto-Muzeo en Svitavy:** Ottendorfer-domo, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, muzeo@esperanto.cz
www.muzeum.esperanto.cz

**Kontrollegis:** la komitato, K. Votoček, V. Türk, P. Polnický

Nova tutjara ekspozicio

# "LA HOMO KONTRAŬ BABELO"

en Esperanto-Muzeo en Svitavy

La ekspozicio, inaŭgurita la 9-an kaj 10-an de junio 2017, estas ĉi-foje dediĉita al la 100-jara datreveno de la forpaso de d-ro L. L. Zamenhof kaj al du gravaj, ankaŭ jubileantaj pioniroj de Esperanto en Ĉeĥio. Tiuj estas precipe František V. Lorenc (1872-1957), kiu kiel 18-jara malriĉa studento-poligloto eldonis en 1890 en Pardubice propra-rimede la 1-an Esperanto-lernolibron por ĉeĥoj, kaj instruisto Teodoro Ĉejka (1878-1957), kiu ekde 1900 komencis en Bystřice pod Hostýnem verki kaj eldonadi la unuajn lernolibrojn, vortarojn kaj redakti la unuajn ĉe ni aperantajn gazetojn kaj tiel fakte fondis Esperanto-movadon en nia lando.





En la ekspozicio vi malkovros tekste kaj surfote pli ol eblus ekz. en Vikipedio. Kio ne eniĝis sur la panelojn, disponeblas en apartaj dosierujoj. Estas prezentataj ankaŭ historiaj fotaĵoj, unike adaptitaj en la artaj fotoprogramoj, parto de la genealogia arbo de Zamenhof, kreita de J. Křížková, kaj unikaj fotaĵoj el la familia fotoarkivo, afable liveritaj de la filo de T. Čejka. Pri ĉiuj tri personoj estas preparitaj librovitrinoj kaj pri d-ro Zamenhof krome ankaŭ elekto de kolektmaterialoj.

Ĉar la ekspozicio estis finance subtenita de la Regiono Pardubice, kadre de la projekto *"Pardubice - lulilo de Esperanto en ĉeĥaj landoj",* vi malkovros ankaŭ historiajn interesaĵojn pri la movado en la regiono mem. Ni prezentas ĉi-tie ankaŭ plurajn rezultojn de nia detektiva esplorado: ekz. pri identeco de bela juna nobelino, kontribuinta komence de la jarcento al la gazetaro per siaj beletraĵoj, kiu estis vivsorto de la ĝis nun plej malnova malkovrita esperantisto el la distrikto Svitavy, aŭ kiel aspektis kaj nun aspektas domoj, kie estiĝis Esperanto en Prago. La fotaĵoj estas akompanataj ekz. de la bela mozaiko de la Praga Kastelo de Petr Diblík, kiu dank' al sia hobio eniris ankaŭ la Ĉeĥan Libron de Rekordoj.




Por ŝatantoj de historiaj bildkartoj ni prezentas plurajn el la kolekto de P. E. Skála el Horažďovice el la jaroj 1908-1913, pruntedonita de lia nepino s-ino Podlešáková. Inter liaj Esperanto-korespondantoj eksterlande ni malkovris pere de interreto kaj kontaktoj kun lokaj esperantistoj plurajn interesajn personojn, inter ili kun la plej alta probableco ankaŭ la tiam 15jaran princon Alberton, kiu poste fariĝis la reĝo Georgo la 6-a kaj la patro de la brita reĝino Elizabeto la 2-a.

Por kolektantoj povas esti interesaj ankaŭ unike prezentitaj specimenoj el la verkaro de Dolfa Bartošík (1907-1989), kiu estis ne nur filatelisto, sed ankaŭ bibliofilo kaj grafikisto.





*F. V. Lorenc kiel junulo*

La Klubo de amikoj de Esperanto en Svitavy prezentas en la ekspozicio fotaĵojn el sia riĉa aktiveco, siajn eksterlandajn kontaktojn, precipe en ekstereŭropaj landoj, kaj pretigis ankaŭ panelon pri bildkartoj el la tuta mondo el la muzea kolekto. Membrino de la klubo Dagmar Martinková ekspozicias siajn artaĵojn kaj Zdenka Novotná el Česká Třebová plurajn pupojn el sia kolekto, ĉi-foje el la naskiĝlando de d-ro Zamenhof. Vi povos konatiĝi kun kelkaj interesaj gastoj en nia muzeo kaj ilia literatura aŭ muzika verkaro.

En la ĝenerala ekspozicio por la publiko disponeblas nun ekz. konciza enkonduko en la lingvon mem, panelo "Esperanto estas pli ol lingvo" kaj aktualaĵoj pri la apliko en Interreto, kiuj povos esti informhavaj ankaŭ por spertaj esperantistoj. Aktualigitaj estis paneloj pri avantaĝoj de vojaĝado kun Esperanto kaj pri ĝia apliko en turismo. Al la temo ligiĝas ankaŭ reprilaborita tablovitrino pri turismaj materialoj. Komplete nova estas la ĝenerala libroekspozicio, kiu i.a. akcentas ne nur kelkajn jubileantojn (ekz. F. Kožík aŭ M. Lukáš), sed ankaŭ la libronovaĵojn tradukitajn aŭ originajn, reagantajn al la enmonde aktualaj sociaj temoj. Prezentataj estas ankaŭ kelkaj el la valoraj libroj, kiujn ni sukcesis denove akiri pere de la Fondaĵo Bachrich.


Por la vizitantoj ni pretigas ankaŭ multmediajn dosierojn en la infopanelo kaj en la nova esplorkomputilo, kion ni nun ne sukcesis pro neatenditaj teknikaj obstakloj. La disponigon ni planas kadre de la Internacia Renkontiĝo, kiu okazos en Svitavy inter 22. kaj 28.9.2017, al kiu vi estas kore invitataj!




Th. Čejka kun Masaryk kaj liaj filo kaj nepo

La Esperanto-Muzeo malfermitas kaj atendas vin tutjare, ĝis septembro 2018. La enirbiletoj kontraŭ nuraj 10 ĉeĥaj kronoj haveblas en la kaso de la Urba Muzeo kaj Galerio (marde-vendrede 9-12 kaj 13-16h) aŭ en la apuda teejo Bela momento (marde-dimanĉe 15-21h). Se vi deziras komentatan trarigardon kaj renkontiĝon kun iu loka esperantisto, bv. nepre ĝustatempe anticipe anonci vin al la estrino de la muzeo Libuše Dvořáková kaj veni laŭ la reciproka interkonsento (kontakton vidu sur la p.2).

Bv. ne forgesi, ke nia muzeo estas plene prizorgata volontule kun malalta budĝeto kaj ke ni ne povas garantii konstantan servadon el la muzea ejo.




Pretigo de la ekspozicio estis tre postulhava por tempo kaj energio kaj ni ĝojos, se rezulto de nia laboro povos servi laŭeble al la plej multaj vizitantoj. Ni bonvenigas vian viziton kaj vian helpon rilate ĝian diskonigon - rekomendu ĝin al viaj parencoj aŭ geamikoj, kiuj povus veni al ĝi vojaĝante tra la regiono!



*El la agado de Svitavanoj*

La ĉeĥlingva priskribo de la ekspozicio troviĝas en Artikolaro en la retejo muzeum.esperanto.cz.

Ilustraj fotaĵoj estas kolektataj en la fotoalbumo, disponebla en la Fotogalerio en la sama retejo.

Mi dankas precipe al membroj de la Klubo de amikoj de Esperanto sub gvido de Livuše Dvořáková, kiuj kontribuis al la ekspozicio kaj helpis ofereme dum la fina instalado. Krome al M. Malovec kaj P. Chrdle pro kontribuoj kaj revizioj rilate temojn pri F. Lorenc kaj T. Ĉejka, al doc. Mirek Čejka pro disponigo de la familiaj fotaĵoj, kaj al ceteraj ekspoziciantoj (J. Křížková, Z. Novotná, H. Podlešáková, P. Diblík). Mi antaŭĝojas vian viziton kaj esperas, ke vi trovos en ĝi ion por vi novan kaj interesan!


*Pavla Dvořáková, ekspoziciestro*



**Růže Zamenhof** - *Rozo Zamenhof*

**Vyšlechtil Gustav Brada (1883-1937) v r. 1932**
**(výška rostliny 280 cm, průměr květu 6 cm)**

*Plantis Gustav Brada (1883-1937) en la j. 1932*
*(alteco de la planto 280 cm, diametro de la floro 6 cm)*



*El la verkaro de Lorenc*

# Muzea nokto

Por vendredo la 9-an de junio 2017 la Klubo de Esperanto-Amikoj en Svitavy preparis kune kun teatra ensemblo DOMA programon de la Muzea nokto. Libuše Dvořáková bonvenigis ĉiujn ĉeestantojn inkluzive de gastoj el eksterlando – Japanio, Slovakio, Francio, Aŭstrio, Kartvelio kaj Pollando.



Ŝi tralegis longan liston de salutleteroj, kiuj venis el la tuta mondo okaze de inaŭguro de la nova ekspozicio „La homo kontraŭ Babelo“. Saluton sendis ankaŭ la nuntempa UEA-prezidanto D-ro Mark Fettes, eksa UEA-prezidanto Renato Corsetti kaj aliaj gravuloj.




Petr Chrdle prelegis je la temo "Francisko Valdomiro Lorenz – en Bohemio forgesita geniulo". Post la prelego konata aŭstria esperantisto Martin Sttupnig kune kun Margit Turková baptis novajn librojn pri Lorenz en la ĉeĥa kaj en Esperanto de prof. Vlastimil Novobilský eldonitajn de Kava-Pech. La prelegon ĉeestis ankaŭ urbestro el Vrdy Antonín Šindelář kaj bibliotekistino Petra Korbelová. Ni interkonsentis kun ili pluan kunlaboron por propagando de F. V. Lorenz en lia naskiĝa Zbyslav, kiu estas parto de Vrdy.



Ĉar parto de nia ekspozicio estas dediĉita al niaj gastoj, la ĈEA-prezidantino Libuše Hýblová tralegis poemon, kiun verkis Mikaelo Bronstein dum sia restado en Svitavy okaze de OSIEK-konferenco. Mária Pilková la poemon enĉeĥigis kaj mem tralegis la tradukon. Sekvis inaŭguro de la nova ekspozicio, kiun prezentis Pavla Dvořáková. Antaŭ vesperiĝo konata slovaka esperantisto kaj vojaĝisto Ján Vajs prelegis pri la 12-a internacia renkontiĝo de esperantistoj en Nepalo. En la vespera programo laŭ reĝisorado de Radka Oblouková elpaŝis lokaj klubanoj kun aktoroj de DOMA. Inter la publikon venis ankaŭ L. L. Zamenhof rolata de amatora aktoro Jan Řepa el Netolice.

La tutan programon filmis Pavol Kaščák, kiu siajn videojn prezentas en la retejo de Verda Stacio.



Inter la gastoj estis sinjorino Sachiko Hayashi el Japanio, kiu interesiĝis pri la ĉeĥa historio. Tial ni dimanĉe vizitis Lidice kaj Terezín, lunde fabrikon de Oskar Schindler en Brněnec kun akompano de s-ro Olbert kaj ekspozicion Oskar Schindler en la Urba Muzeo kaj Galerio Svitavy, kie nin gvidis historiisto Radek Fikejz. Pri siaj ekkonoj s-ino Sachiko verkos por gazeto Horloĝo eldonata en Japanio. Mallongan filmeton pri la vizito elsendis kabla televido de Svitavy kaj Litomyšl.



La programo estis daŭrigita sabate per rememoro pri la morto de Zamenhof.

Post saluto de la eksterlandaj gastoj estis tralegita teksto pri lastaj tagoj de Zamenhof kaj prezentitaj novaj retejoj pri lia vivo. Estis ripetitaj la prelegoj pri Lorenz kaj Nepalo. Sabata vespero estis finita per koncerto de grupo NO PROBLEM el Kostelec na Hané, kantanta ĉeĥe kaj ankaŭ esperante. Ilian esperantlingvan kompaktan diskon baptis la direktorino de Urba Muzeo kaj Galerio Blanka Čuhelová.

*Libuše Dvořáková*

*fotoj V. Skuta, O. A. Fischer*









# PRI LA EKSPOZICIO

Je la 23a de marto okazis en la Urba muzeo en Svitavy interesa evento: la malfermo de bildekspozicio sub la titolo "Smíření" (Reakordiĝo), kies aŭtoro estas **VÁCLAV LAMR**.

La afero koncernas nin - esperantistojn - pro jenaj kialoj:

1. V. Lamr estas (praga) esperantisto
2. Nia Esperanto-muzeo (situanta eĉ najbare) fruktodone kaj amikece kunlaboras kun la menciita institucio.

Do proponis sin plej taŭgaj cirkonstancoj por montri al publiko la verkon de V. L., kun kiu ni konatiĝis ĉe la UK en Nitro. Tie li ankaŭ ekspoziciis, kvankam nur desegnaĵojn kaj nur en koridoro. Tamen li en Nitra postlasis sian spuron: ĉe la ferma okazo li donacis grandan kolorigitan desegnon (La madono kun infano) al nia protektanto - al la primatoro de la urbo Nitro, kiu akceptis ĝin kun ĝoja danko...

Kiel aludas la klarigaj frazoj kaj la titolo de la menciita ekspozicio, la temoj de la artisto estas precipe religio-koncernaj; kiel kompaktiga ŝnuro iras tra lia vivo biblia judaismo kaj biblia kristanismo, kiuj estas fundamentoj de la eŭropa kulturo. Sed Václav ne estas nur "religia profeto", sed male: la moralajn principojn de ambaŭ fluoj li tutan sian vivon aplikas en pragmataj sferoj helpante ĉie, kie liaj fortoj sufiĉas.

Do, kie lia verko havus pli taŭgan spacon, ol en la Memorejo de Oskar Schindler, kiu troviĝas en la Urba muzeo en Svitavy! Por niaj legantoj ni proksimigas, ke Oskar Schindler estas memorigata kiel savanto de cca 1000 judoj, kiuj laboris en liaj fabrikoj. Li naskiĝis en Svitavy kaj la urbo honorigas lin per la memorejo, kiu estas unusola kaj unika en la mondo.

Kaj nun kuniĝis la "destinaj cirkonstancoj" kaj Václav Lamr havas la okazon proklami sian jud-devenon per jena ekspozicio, kiu havas la subtitolon: "Serĉado de la David-Stelo". Sub tiu titolo okazadas la Urba muzeo ĉiujaran kulturan entreprenon, por rememorigi la judan etnon, kiu pasinttempe ekonomie kaj kulture formis la regionon ĉirkaŭ Svitavy. Sian taskon la muzeo plenumis ankaŭ koncerne la ekspozicion - amase kontaktis la estantajn judajn memorejojn (ankaŭ eksterlandajn - ekz. en Krakovo), sed precipe la lernejojn en Svitavy kaj kulturajn instituciojn de la urbo kaj en la ĉirkaŭaĵo. Tiamaniere la sespinta Davida stelo ("logo de Kreinto" - diras V.L.) kuniĝis kun la stelo verda - simbolo de ESPERO.



Por STARTO skribis Margit Turková - kunorganizanto de la ekspozicio

## INTER-FEST BJELOVAR

**5 – 12 aŭgusto 2017**

Por tiuj, kiuj ne povas veturi al UK en Seulo, sed volas partopreni similan renkontiĝon en Eŭropo, la kroataj esperantistoj preparis festivalon INTER-FEST en la historia urbo Bjelovar. Temo: **Kultura kunfandiĝo de la multetna Eŭropo**.




www.esperanto-bjelovar.hr/festival/index.html

En la **Provizora programo** de sabato ĝis sabato oni trovas ekspozicion *Mia unua alfabetlibro* en la Urba Muzeo, projekciadon de filmo *Esperanto* de Dominique Gautier, sanktajn mesojn en la Katedralo de Sankta Teresa de Ávila, Nacian koncerton en la urba parko, foiron de ideoj, kurson de la kroata, Internacian koncerton (Mikaelo Bronŝtejn, polaj kaj francaj muzikistoj kaj Neven Mrzlečki), prezenton de la *Elektitaj Tekstoj pri Internacia Juro* de Ivo Lapenna, literaturajn kafejojn, ekspozicion *Azia paletro* de Ho Song, prezenton de la *Oklingva medicina enciklopedia vortaro* de Jozo, libroprezenton de *La nigra patrino tero* de Kristian Novak, ses ekskursojn.

Aliĝilojn akceptas:
**esperanto.bjelovar@gmail.com**
www.esperanto-bjelovar.hr/festival/esperanto.html

## Esperanto en amaskomunikiloj

**Pošta pro tebe** (*Poŝto por vi*) – en la fama televida programo aperis komence de aprilo 2017 juna knabo, 15-jara Sebastien, kiu deziris renkontiĝi kun sinjoro, kiun li antaŭ 10 jaroj renkontis en trajno kaj kiu kantis en Esperanto. Montriĝis, ke temis pri Zdeněk Rusín, sed pro sanproblemoj anstataŭis lin en la televido lia filo kun familio.

En **AZ-kvizo** de Ĉeĥa Televido aperis la 21-an de aprilo Milada Zemanová el Pacov, kiu en la konkurso venkis. Esperanton ŝi ne forgesis mencii.

En la 8-a numero 2017 de la fervojista gazeto **Obzor** estis eldonita artikolo *Esperantisté železničáři bilancují* (Esperantistoj – fervojistoj bilancas).

La 12-an de majo 2017 estis festata la 15-jariĝo de la **ĉeĥa Vikipedio** – plurfoje aperis en televidoj, radioj kaj gazetoj la informo, ke la ĉeĥan version prilaboris esperantisto M. Malovec el Brno. Sed la 12-an de majo 2002 ĝi publikiĝis anglalingve, la ĉeĥlingvan version tradukitan el Esperanto oni prezentis nur la 6-an de januaro 2003, post kiam pri traduko petis usona esperantisto Chuck Smith.

**Cena Antonína Hobzy** (Premio Antonín Hobza) – La premio estis nomita laŭ fondinto de skoltismo en Třebíč. Ĉijare ricevis la premion apud kantistino Helena Nosková kaj sokolanoj Lenka kaj Radek Stejskal ankaŭ **Pavel Sittauer**, pro sia esperantista laboro en la tendaro Lančov gvidata en skolta spirito.

La informon alportis *Třebíčský zpravodaj* (Informilo de Třebíč, marto 2017).
http://www.trebic.cz/assets/File.ashx?id_org=16973&id_dokumenty=31939

# Na pomoc dětským esperantistům

Některá přátelství přerostou i v lásku a mezinárodní manželství. Proto existují i rodilí mluvčí esperanta. Tyto rodiny se stýkají a každoročně scházejí (pokaždé v jiné zemi), na svém webu společně tvoří a překládají pro své děti písničky, pohádky i krátké filmy a sdílí své zkušenosti, které se dají využít i pro další dětské kurzy.



http://familioj.wikispaces.com/

Další informace o dětské literatuře v esperantu:
http://esperantobrno.cz/malnova/deti.htm

Universala Esperanto-Asocio | AKTIVULA MATURIGO | Estrara Subteamo: MOVADO

**AMO = Aktivula Maturigo** estas komuna aranĝo de UEA kaj ILEI por trejni esperantistojn kiel varbi kaj instrui. Ĝi okazas ĉiam en alia lando. Pliaj informoj ĉe Vikipedio
https://eo.wikipedia.org/wiki/Aktivula_Maturigo
kaj Youtube

# Lančov 2017

Esperanto, angličtina, němčina

**Termíny**
16.7.-29.7.2017
30.7.-11.8.2017
**Cena**: 3890 Kč až 4390 Kč podle jazyka a věku



**Setkání bývalých účastníků tábora**: 11.-13.8.2017
**Adresa:**
Klub esperanta a světových jazyků Theodora Kiliana, Riegrova 62, 674 01 Třebíč
**e-mail:** let.lancov@seznam.cz
**Stránky**: http://set-lancov.cz

**Facebook:**
https://www.facebook.com/letniesperantskytabor.lancov

**České tábory:**
http://www.cesketabory.cz/tabory/9915-letni-jazykovy-tabor-2-etapa-2017.html

http://www.cesketabory.cz/tabory/9916-letni-jazykovy-tabor-3-etapa-2017.html


# TEO KAJ AMO 2017



Jen komuna foto de la prelego Teo kaj amo por neesperantistoj. Partoprenis ĉirkaŭ 50 personoj kaj post la prelego kelkaj personoj petis min instrui Esperanton en la bibilioteko de Nový Jičín.



En la fino ni prezentis nian ĉijaran filmon por filmkonkurso Teo kaj Amo - Patrino kaj anoncis ke ni estas 4-a la plej ŝatata filmo en interreta voĉdonado el 77 filmoj. Poste ĉiuj homoj longe aplaŭdis.




Partoprenis ankaŭ multaj homoj kiuj partoprenis nian ekspozicion Teo kaj amo en julio 2016, ĉar ili diris ke nia agado kaj parolado pri Ĉinio helpe de videoj ege plaĉas al ili. Oficistino de Kulturdomo en najbara urbo Studenka petis nin, ke ni faru denove la saman prelegon en ŝia urbo. Do la sama prelego en Studénka okazos denove en novembro 2017.



Se ni atingos pli da lernantoj, mi tuj proponos al ili ke ili iĝu membroj de nia nova klubo Vanaivan en Kopřivnice.

Paŭlo Kaščák

Rimarkigo: Verda Stacio helpis prepari ankaŭ brazilan konkursan filmon Mia verda stelo kun gitarludado de Rafael Milhomem.



# Ekspozicio en Nový Jičín




TEO KAJ AMO – fotoj de Pavol Kaščák kaj Rostislav Čubok en Urba biblioteko de Nový Jičín 19.6. - 29.8.2017. Plie ekzistas speciala ĉina teo *Esperanto* subtenata de familio Zamenhof.






# Giorgio Silfer en Prago

La 31-an de majo 2017 en Unitaria Praha en la strato Anenská fama svisa esperantisto, verkisto kaj literatura sciencisto Giorgio Silfer prezentis sian libron *Historio de la Esperanta Literaturo* (2015), kiun li verkis kune kun Carlo Minnaja kaj kiu ricevis premiojn OSIEK kaj Grabowski. Ĉeestis dudeko da esperantistoj.






# Lina Gabrielli

(1930-2016)

itala esperanto-verkistino forpasis la 16-an de decembro 2016. Ŝi estas aŭtorino *La kombilo, Bill kaj lazuraj okuloj, Karnavalo, Ni devas vivi* (kun K. Walraamoen), *La ĝardeno de la urbestro, Vivendo.*

# André Albault

(1923-2017)

La iama prezidanto de Akademio de Esperanto mortis la 17-an de majo 2017. Li estis redaktoro de *Internacia Pedagogia Revuo* kaj *Monda Kulturo*, kunverkis *Vortaron francan-esperantan* kaj *Anatomian nomenklaturon*.

# 115 jaroj de EK Praha

*En La Progreso 4-5/1927 Fr. Barth publikigis sian rememoron, kiel li iniciatis fondon de la Praga klubo en 1902 kiel 18-jara junulo.*

**FONDO DE „ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA".**

Al la historio de la internacia lingvo en Ĉeĥoslovakio.

La jaroj pasas. Pasos jam dudek kvin jaroj de la tempo, kiam ni fondis „Esperantistan klubon en Praha". La samtempuloj malrapide foriras. Certe estus dezirinde ĝustatempe kolekti ĉiujn informojn pri la komencoj de la movado ĉe ni. Nun ankoraŭ oni povas kolekti multajn rememorojn de la partoprenintoj kaj multajn skribajn dokumentojn — ambaŭ fontoj, personoj kaj dokumentoj, estos senĉese pli kaj pli maloftaj.

Mi volas provi priskribi la historion pri la fondo de la klubo en Praha.

En la fino de la jaro 1901 aperis en „Sběratel dopisnic" (Kolektanto de poŝtkartoj), redaktita de S-ro Jirků, tiame funkciulo (komitatano aŭ oficisto) de Komerca muzeo en Praha, se mi ne eraras, malgranda notico malpli ol kvarlinia pri la internacia lingvo esperanto. Por doni pli detalajn informojn proponis sin S-ro Theodor Čejka, instruisto en Bystřice pod Hostýnem (Moravio). Mi do demandis kaj efektive ricevis pakaĵon da diversaj materialoj prezentantaj imagon pri esperanto kaj kune la statuton de „První rakouský klub esperantistů v Brně" (La unua klubo de aŭstriaj esperantistoj en Brno, Moravio; prezidanto redaktoro K. Pelant, sekretario J. Kajš).

Lerninte esperanton mi nature komencis serĉi aliajn partianojn en Praha. Mi petis la klubon en Brno sciigi al mi la adresojn de esperantistoj el Praha; oni rekomendis al mi serĉi ilin en la adresaro de Zamenhof, eliranta tiame kiel malgranda kajereto unufoje dum la jaro. En la jarkolekto 1902 mi trovis krom mia adreso ankoraŭ dek aliajn de Praha. Mi trovis, ke ok el tiuj enskribitoj dume jam perdis la intereson pri la afero aŭ ŝanĝis loĝejon, ke ili transloĝiĝis, „oni ne scias, kien".

Mi rimarkis, ke oni devas fari propagandon de unu persono al la alia. Sed tio estis afero tre malfacila. Kiu travivis la komencojn de esperanto ĉe ni, certe memoras la parolaĉojn ĉe sola aludo pri esperanto. Estis al mi klare, ke la unuopulo sen libera tempo kaj sen financaj rimedoj malmulte atingos kaj inter miaj konatoj ne estis personoj tiel feliĉaj por esti riĉaj je aluditaj kvalitoj. Tial ni decidis kolekti la fortojn, fondi societon.

Belega, senzorga entreprenemo de la junaĝo! Al ni ŝajnis nenio pli facila ol fondi la societon, al kiu aliĝos centoj da membroj, kiu fariĝos finance potenca kaj entreprenos energian propagandon por la afero, kiu fariĝis al ni kara.

Iam en duono de februaro 1902 aperis en tiama ĵurnalo „Pražský denník" (antaŭulo de la nuna „Československá republika") — malkara, ne tro legata registara ĉiutaga gazeto — propaganda artikolo pri esperanto subskribita „Fix". Jen, subite aperis neatendita kunlaboranto kaj eĉ ĵurnalisto. Ĉe la vizito mi trovis, ke sub la pseŭdonimo „Fix" estas kaŝita la redaktoro mem de la ĵurnalo S-ro Xaver Menhard, kiu tuj kompleze promesis aperigadi pluajn artikolojn, se mi transprenos la devon respondi eventualajn petojn pri informoj.

Miaj esperoj kreskis. Sed anstataŭ atendata amaso da interesantoj aperis sole kelkaj (se mi ne eraras, tri) demandintoj. Tamen tio estis sukceso, pro kiu ni estis neordinare fieraj kaj kun plezurego ni daŭrigis nian laboron.

Ni volis fondi en Praha filion, grupon de la klubo en Brno kaj tiu ĉi komence estis inklina fari tion, sed baldaŭ li konsilis fondi memstaran klubon.

Fondi klubon signifis posedi almenaŭ tiom da membroj por sufiĉi krei komitaton. Afero malfacila, kie preni membrojn? Sed tiame estis ora epoko de esperanto; ĉiu samideano estis ankaŭ klubano. Do fari samideanojn!

La laboro ne estis tiel facila, kiel ŝajnas al ni hodiaŭ. La cirkonstancoj antaŭ dudek kvin jaroj estis iom aliaj kaj eĉ la vorto „internacia“ estis tiam nebone sonanta. Krom tio la propagando estis farata sole de „ni junuloj“ sen spertoj, sen mono, sen tempo, ĉar ni preskaŭ ĉiuj staris en la komenco de nia kariero.

Mi ne scias, kiel longe ni starus en la komencoj, se ne estus S-ro red. Fix-Menhard, kiu persiste aperigadis noticojn pri esperanto en „Pražský denník". Danke tiun ĉi cirkonstancon, tamen kolektiĝis kelkaj scivolemuloj, el kiuj la plejmulto direkte demandis pri la venonta klubo.

La propaganda agado de Menhard altiris neatendite alian ageman laboranton, teatran raportiston S-ron Kriegelstein-Vojnar, spertulon en societo, bonegan paroliston kaj fervoran societgvidanton — li plej energie instigis la fondon de la klubo. Li fervore propagandis esperanton en tre vastaj rondoj de siaj personaj konatoj kaj en ankoraŭ pli vastaj rondoj de legantoj de sia semajna gazeto „Nájemník“ (La luanto), multe serĉata pro sia teatra rubriko. En la gazeto li kompleze malfermis rubrikon por esperanto: li eĉ dediĉis duonon aŭ unu kolonon semajne por la gramatiko kaj ekzercaro ; per tiu ĉi rubriko oni gajnis novajn partianojn kaj — ĉefe — oni konatiĝis kun malnovaj samideanoj.

Hodiaŭ eble multaj ridas kaj miras, ke ĝuste „Pražský denník“ kaj „Nájemník“ estis niaj organoj kaj perantoj. Kial ne la grandaj kaj ŝatataj ĵurnaloj? Tute simple pro tio, ke la plejmulto el granda vico da ĉeĥaj ĵurnaloj ĵetadis la noticojn pri esperanto en korbojn kaj la petojn pri publikigo de artikoloj eĉ ne respondadis. Kaj kiu respondis, tiu sciis trafi. Ekzemple la redakcio de „Právo lidu“ (Rajto de la popolo; ĉefĵurnalo de la ĉeha sociala demokratio) mian peton publikigi deklinian (!) noticon respondis (3. IV. 1902) tiel:

*Nemáme času ani chuti fedrovat Esperanto. jestli tak činí p. Pelant v Brně, je to jeho věcí a nemá pro nás žádného významu. Pokud se týká nějakého insertu, je věcí naší administrace, na níž se račte obrátiti.*

*Ant. Němec, redaktor.*

*Ni havas nek tempon nek volemon propagandi esperanton. Se tion faras s-o Pelant en Brno, tio estas lia afero, por ni sensignifa. Koncerne iun anoncon volu turni vin al nia administracio, ĝi estas ĝia afero.*

*Ant. Němec, redaktoro.*

Tiame estis aranĝata en Praha „La unua laborista ekspozicio“, la unua ĉe ni kaj eble la unua sur la mondo. Ŝajnus nenio pli facila ol propagando de la lingvo internacia sub la devizo „La proletarioj de la tuta mondo unuiĝu!“

Se ni nenie trovis la komprenon, certe ni trovos ĝin tie ĉi. Sekve ni skribis al la ekspozicia komitato petinte permeson elmeti afiŝojn, meti atentigon en katalogon kaj fari diversajn paŝojn, kiuj liodiaŭ ŝajnas al ni tute naturaj. Sed, kiel ni eraris. Venis al mi respondo:

*Vážený pane! K vašemu dopisu ze dne 17. V. sdělujeme s vámi, že bylo ve výboru „I. dělnické výstavy v Praze“ ustanoveno, aby z Vámi zamýšlených plakátů vyžádán byl poplatek jedné koruny za kus. Doufáme, že při této nízké ceně na poplatek přistoupíte.*

*Ant. Reis, místopředs.,*
*K. Beránek, jednatel.*

*Estimata sinjoro ! Al via letero el 17. V. ni sciigas al vi, ke la komitato de la „I. laborista ekspozicio en Praha“ decidis postuli la pagon de unu krono por ĉiu de vi intencata afiŝo. Ni esperas, ke la pagon de tiel malalta prezo vi akceptos.*

*Ant. Reis, vicprezidanto,*
*K. Beránek, sekretario,*


La originalojn de tiuj ĉi kaj de aliaj leteroj mi havas konservitaj por ebla venonta arkivo pri internacia lingvo ĉe ni (vidu specialan artikolon pri ĝi en tiu ĉi gazeto).

En la jaro 1902 la pago unu krono sole por loko estis tre granda, speciale por homo kun monata salajro dudek kvin guldenoj kaj paganta sola ĉiujn poŝtajn elspezojn senĉese kreskantajn.

Sed ĉio ĉi ne prenis al ni la volon por pluaj entreprenoj, kiuj ĉiam finiĝis kun malsukcesoj, pro kiuj ni miras ja, sed kiujn ni tamen preterpasis irante pluen.

*(daŭrigota)*

# Amika invito



al tradicia semajna seminario en Ĉeĥa paradizo, en familian pensionon **ESPERO** en vilaĝeto **SKOKOVY** – 75 km nordoriente de Prago – en puran naturon

**de la 7-a septembro ĝis 10-a septembro 2017**

inter homoj sanaj, handikapitaj, junaj kaj maljunaj, kiuj ŝatas Esperanton kaj deziras ĝui naturon. Oni povas ekzerci korpon kaj spiriton, krei mane memoraĵojn kaj ion alian plu…babili, frandi, promeni, ekskursi, diskuti, ludi, eĉ lerni….

Senbara modesta medio, 2-5 litaj ĉambroj, prezo 420 Kč/tago (1 Eŭro 27 Kč) por kompleta servo je unu tago. Necesejoj kaj duŝeoj en koridoro. Interreta konekto. Oni pagas surloke.

Kontaktoj: Jindriška Drahotová, Sadová 745/36, Mladá Boleslav 293 01
Tel: 420 720 652 320
drahotovaesperanto@seznam.cz
drahotova@esperanto.cz
www.sweb.cz/espero.skokovy
www.mlboleslav.cz/esperanto
www.evinatelier.cz
aeh@esperanto-aeh.eu
www.esperanto.cz

# Kroměříž – la urbo de nia konferenco

La urbo Kroměříž - ĉarma Venecio de Haná, troviĝanta ĉe la rivero Morava, dua plej granda urbo en la regiono Zlín.

Historio de la urbo komenciĝas en la 7a jarcento, kiam rezidis ĉi tie slava gento. Poste ekestis merkata vilaĝeto kaj en la jaro 1260 episkopo de Olomouc, Bruno von Schauenburg, iniciatis superigi la vilaĝon je urbo. Li fondis burgon en gotika stilo, kapitulon de Sankta Maŭrico kaj fortikaĵon ĉirkaŭ la urbo. Kroměříž fariĝis sidloko de ĉefepiskopoj de Olomouc.

En la 15a jarcento oni ekkonstruis la (hodiaŭ fame konatan) kastelon. Multon detruis la 30-jara milito. Sveda armeo konkeris la urbon, forbruligis ĉiujn bibliotekojn, urbajn dokumentojn en urbodomo kaj kaŭzis aliajn katastrofojn. La restintan trionon da loĝantaro turmentis pesta epidemio.

En pluaj jaroj Kroměříž denove naskiĝadis kaj iĝadis prosperanta urbo: la kastelo estis rekonstruita en renesanca stilo, ankaŭ ĝia Subkastela ĝardeno, oni konstruis multajn novajn domojn precipe ĉirkaŭ vastaj urboplacoj, oni fondis Floran ĝardenon.

En la revoluciaj jaroj 1848-49 la kastelo de Kroměříž fariĝis - anstataŭ Vieno - sidloko de Regna parlamento, bedaŭrinde por nelonge. Tamen ĝiaj leĝo-proponoj estis enmetitaj en leĝaron de Aŭstria-Hungara monarkio.

Granda disvolviĝo de Kroměříž datiĝas en duan duonon de la 19a jarcento: revivis ĉi tie komuna vivo civitana, ekestis ĉeĥaj societoj, ekzemple civitana kaj societo de legantoj, kanta-muzika societo Moravan, korpekzercada societo Sokol (Falko). Startis ega ekonomia kresko, speciale nutraĵ-industria... dank ´al nova fervojo, ligilo kun Vieno.


Post 1a mondmilito Kroměříž fariĝis centro de klerigo en centra Moravio. La 2a mondmilito estis tragika ĉefe por la juda loĝantaro: multaj homoj estis deportitaj en koncentrejojn, ilia sinagogo estis ruinigita. Restis nur (nuntempe aprezata) juda tombejo.

En la 1960aj jaroj la historia centro de la urbo estis deklarita "URBA MEMORIGA REZERVEJO", en 1998 la kastelo kaj ĝardenoj aperis sur listo de "MONDA KULTURA HEREDAĴO DE UNESCO".

Nuntempe en la urbo troviĝas kelkaj belegaj preĝejoj, multaj entreprenoj, precipe nutraĵ-prilaborataj, multaj vidindaĵoj - krom aliaj "monda unikaĵo" INFERO DIABLAĴO, spegula ĉambrego... kelkaj mezlernejoj. En unu el ili, en ĈEFEPISKOPA GIMNAZIO, okazos ĉi-jara kunveno de ni, ĉeĥaj kaj certe ankaŭ eksterlandaj esperantistoj.

Ĉarma kaj agrabla urbo Kroměříž kaj komitatanoj de ĈEA invitas Vin, ĉiujn esperantistojn, partopreni nian eble plej gravan esperantan aranĝon de la jaro. VENU!

*Lchal*



# Přihláška na konferenci ČES (Kroměříž 13.-15.10.2017)

Přihlášku vyplňte a zašlete e-mailem na adresu vratislav.hirs@esperanto.cz nebo poštou na adresu pokladníka Ing. Vratislav Hirš, Ruprechtov 117, 683 04 Ruprechtov nebo úplně nejlépe - vyplňte elektronický formulář na adrese http://esperanto.cz/aligxilo2017

**Doporučení:** Po vyplňovacích polích se pohybujte klávesou TAB. Tak žádné políčko nepřehlédnete.

**jméno a příjmení účastníka** (příp. včetně titulů - tak bude na jmenovce účastníka sjezdu)

adresa:

ulice

PSČ a místo

e-mail telefon

**variabilní symbol platby** – číslo průkazu člena ČES, popř. ČEJ či SKEF (pro ověření nárokovaného zvýhodnění), nečlenové napište 5 číslic, kde první nebude „0“

Číslo pasu vyplní jen ubytovaný zahraniční účastník

**Označení u čtverečků křížkem (nastavíte/zrušíte mezerníkem) znamená výběr. Zakroužkování (při ručním vyplňování) okolo čtverečku ruší (chybný) výběr.**

**Přihlašuji se na akci Českého esperantského svazu v Kroměříži, objednávám a zavazuji se uhradit následující.** (Přihláška je platná až po zaplacení.)

| | | |
|---|---|---|
| Základní účastnický poplatek | 350 Kč | ☐ |
| Zvýhodněný účastnický poplatek **pro členy ČES, ČEJ, SKEF přihlášené po 15.9.2017** | 250 Kč | ☐ |
| Zvýhodněný účastnický poplatek **pro členy ČES, ČEJ, SKEF kteří se přihlásili a zaplatili nejpozději 15.9.2017** | 150 Kč | ☐ |
| Čestný člen ČES, nevidomý člen ČES, člen výboru ČES, místní organizátor, správce Libroserva | 0 Kč | ☐ |
| Jako mládežník do 26 let uplatňuji slevu 50 % z účastnického poplatku (nárok na slevu prokáži při prezenci) | | ☐ |

Adresa ubytování : Arcibiskupské gymnázium v Kroměříži, Pilařova 3, Kroměříž 767 01
Je to 1200m od nádraží: https://mapy.cz/s/1Nd5R

Nástup možný od 16:00 v pátek. Pokoje max. 3-4 lůžka se spol. koupelnou a WC na chodbě. Ubytování v prvním (případně druhém) patře bez výtahu. Jídelna, sál a učebna jsou také v prvním patře. Vyklizení pokojů v neděli do 14:00.
**Nelze zajistit druhé (=vegetariánské menu) v jídelně gymnázia.**

Objednávám **zvýhodněný kompletní balíček**:

| | | |
|---|---|---|
| 2 noclehy v (max.) 3-4-lůžkovém pokoji a stravování od páteční večeře do nedělního oběda | 800 Kč | ☐ |
| 2 noclehy v samostatném pokoji a stravování od páteční večeře do nedělního oběda | 1000 Kč | ☐ |
| 2 noclehy a stravování od páteční večeře do nedělního oběda (pouze pro členy výboru a výborem určené pomocníky) | 240 Kč | ☐ |

Objednávám **jen jednotlivé ubytovací a stravovací služby**:
Pozn.: Rozhodně nevyplňujte, pokud již máte objednaný zvýhodněný kompletní balíček výše.

| | | |
|---|---|---|
| večeře – pátek | 70 Kč | ☐ |
| nocleh z pátku na sobotu na společném pokoji | 250 Kč | ☐ |
| nocleh z pátku na sobotu na samostatném pokoji | 350 Kč | ☐ |
| | | |
| snídaně - sobota | 45 Kč | ☐ |
| oběd - sobota | 90 Kč | ☐ |
| večeře - sobota | 70 Kč | ☐ |
| nocleh ze soboty na neděli na společném pokoji | 250 Kč | ☐ |
| nocleh ze soboty na neděli na samostatném pokoji | 350 Kč | ☐ |
| | | |
| snídaně - neděle | 45 Kč | ☐ |
| oběd - neděle | 90 Kč | ☐ |

prosím ubytovat s: (vepište jméno osoby – platí, jen pokud je požadavek vzájemný)

Nebude-li spolubydlící uveden, rozdělíme přihlášené do pokojů dle pohlaví a věku!

| | | |
|---|---|---|
| členský příspěvek ČES na rok 2018 | | Kč |
| případný dobrovolný příspěvek pro ČES | | Kč |
| příplatek za přihlášku a/či platbu po 30.9.2017 | 100 Kč | ☐ |
| za platbu na místě (Přihlášky na místě jsou však bez záruky!) | 100 Kč | ☐ |

Upřesnění pro případ společné platby:

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| Za mne platí | | částku viz „Zaplatím tedy celkem“ níže | | |
| Já platím za | | ještě i částku | | Kč |

**Zaplatím tedy celkem** ........................... Kč

(kontrolu či přepočet provede pokladník ČES, který přihlášku také obratem potvrdí - jedině však - na uvedenou emailovou adresu)

**Úhradu proveďte na účet ČES:**

Fio banka, číslo účtu **2800186228 / 2010**


Jako **variabilní symbol** uveďte číslo svého průkazu člena či čísla, které jste na vyhrazené místo pro číslo průkazu člena (jako nečlen - právě jen pro tento účel) uvedl(a)!

V případě odhlášení se se účastnický poplatek nevrací! Odhlášení po 30.9.2017 budeme řešit individuálně a poplatky zahrnou i již nezrušitelné služby.

V ______ dne ____.2017 ................................................

podpis (pro přihlášky poštou)

# Novaj libroj




Biografion de FVL verkitan de Vlastimil Novobilský esperantlingve kaj ĉeĥe eldonis KAVA-PECH. Subtitolo estas **Atesto pri la vivo kaj verko de eksterordinara homo**.




De la sama eldonejo aperis ankaŭ **Spirita revolucio en la koro de Eŭropo** de Přemysl Pitter (trad. Margit Turková) pri niaj gravuloj (*Venceslao, Milíč, Hus, Hieronimo, Chelčický, Řehoř, Komenio, Masaryk*) kaj **Heredantoj de silentado** de Sabine Dittrich (trad. Aleksandro Montanesko) pri judoj en Ĉeĥio kaj Germanio dum la dua mondmilito.

**Mendeblaj ĉe:** www.kava-pech.cz




Bibliografion de la verkaro de Miloš Lukáš (1897-1976) kolektis lia gimnazia lernanto Zdeněk Hršel (1928-2014) dum 15 jarojn, nun eldonis Klubo de esperantistoj Brno (50 Kč). Listo de ĉiuj trovitaj verkoj de nia majstra tradukisto (http://esperantobrno.cz/malnova/)

Kolekton de prelegoj de la pasintjara KAEST eldonis la eldonejo Espero en Partizánské (www.espero.sk). En la libro troviĝas artikoloj ankaŭ de ĉeĥaj aŭtoroj.

# Ni prezentas:

**NATURISTA VIVO**, oficiala organo de Internacia Naturista Organizo Esperantista, naturista.vivo@gmail.com.

La gazeto enhavas artikolojn (ankaŭ de ĉeĥaj aŭtoroj) pri naturismo, nudismo, pri filozofio kaj teozofio, ofte eĉ fotojn de senvestaj personoj, informojn pri aktualaj naturistejoj kaj nudistejoj, ankaŭ nialande. Ĝi estas gazeto por esperantistoj, por kiuj naturismo estas stilo de ilia vivo.

## La 11-a Mediteranea Esperanto-Semajno en "Les Issambres" 4.3. - 11.3.2017


Post unu jaro ni denove renkontiĝis en suda Francio por kune ĝui agrablan semajnon ĉe la Mediteranea bordo. Partoprenis 101 geesperantistoj el 13 landoj. Alvenis reprezentantoj el Anglio, Belgio, Ĉeĥio, Finnlando, Germanio, Hispanio, Irlando, Italio, Litovio, Rusio, Svedio, Svislando kaj la plej multaj el Francio. La plej juna estis unujara knabineto *Rosaria*, filino de la geedza paro *Marek* kaj *Veronika* el Ĉeĥio. La eventon organizis *Christine Graissaguel* kaj *Monique Prezioso* kun helpo de aliaj esperantistoj. La programo ne estis streĉa, sed interesa. Temis ĉefe pri instruado, promenadoj kaj kulturaj vesperoj. Ankaŭ la hotelo proponis programon, kiun ni povis profiti.


LES ISSAMBRES

Ni loĝis en belega feriejo *Vacanciel* en la hotelo *Val d'Esquière*, ĉirkaŭata de ampleksa trihektara parko por agrablaj promenadoj sub majestaj pinarboj. En la pasinteco ĝi estis palaco. La mirinda loko troviĝas inter la urboj *St. Raphaël* (15 km) kaj *St. Tropez* (24 km).

Sabate la 4-an de marto vespere ĉiuj alvenintoj kolektiĝis por preni aperitivon proponitan de la hotelo. La direktoro de la hotelo s-ro *Silvain Ceccoto* kun la urbestro de la komunumo s-ro *Jean-Paul Ollivier* bonvenigis nin. La dua invito al aperitivo okazis vendrede vespere. Manĝoj kiel kutime estis abundaj kaj bongustaj. Ne mankis variaj desertoj kaj glaciaĵoj, blanka kaj ruĝa vinoj.

Post la unua komuna vespermanĝo prezentiĝis la kursgvidantoj de la kursoj. Dum la semajno okazis kvar diversnivelaj E-kursoj. Verajn komencantojn iniciatis al Esperanto *Christine Graissaguel* el Francio. Iom pli progresemajn instruis *Nina Korĵenevskaja* el Rusio. *Marek Blahuš* el Ĉeĥio proponis kurson helpe de sia komputilo por emfazi rapidecon kaj solvi kelkajn malfacilaĵojn. *Dalia Pileckiene* el Litovio paroligis esperantistojn, dividitajn en kvin grupetoj, pri diversaj temoj pli malpli el psikologia vidpunkto.


*Familio Blahuš*

La kursoj okazis antaŭtagmeze kaj posttagmeze antaŭ la vespermanĝo. Dum la paŭzo je la 10-a horo ni povis trinki teon aŭ kafon kun diversaj biskvitoj kaj ĉokolado. Dum la semajno funkciis ankaŭ libroservo. Ĉifoje oni vendis brokantaĵojn. En la hotelon venis vendistoj, kiuj ofertis diversajn artiklojn por aĉeti. En la ĵurnalo *Var-matin* aperis artikolo pri nia evento kun komuna foto.

Dimanĉe posttagmeze okazis festo en apuda urbeto *Roquebrune-sur-Argens*. Kelkaj el la partoprenantoj ĉeestis ĝin. Pro iom tro malvarma kaj venta vetero ĝi estis ne tiel impona kaj homamasa kiel pasintjare. Diversaj metiistoj prezentis ok kilogramajn ĉokoladajn tabulojn kun bildoj, kiuj estis poste aŭkciataj. Gesinjoroj *Gabalda* aĉetis unu "tabulon", dispecetigis ĝin kaj dum la kafo-paŭzoj ili regaladis kursanojn dum la tuta semajno.

Merkrede posttagmeze ni ekskursis al la proksima urbeto *Cogolin*, kies simbolo estas la koko. Ni rimarkis ĝin plurfoje dum la promenado kun loka ĉiĉeronino. Ŝi rakontis al ni ĝian historion. La urbo fieras pro sia horloĝturo. Ĉiujare en majo en la urbo okazadas la tradicia festo *Bravade de la St-Maur* (Bravaĵoj de la sankta Maŭro - patrono de Cogolin) por celebri la bataleman historion de la komunumo. La urbo estas ĉefe konata pro fabrikado de pipoj kaj pro manproduktado de tapiŝoj. En la malgranda familia entrepreno, kie estas produktataj pipoj finiĝis la ekskurso tra la urbo *Cogolin*. Revenvoje ni ankoraŭ haltis ĉe la haveno de *Port-Grimaud*. Ĉiutage post la tagmanĝo estis libera tempo por mallongaj promenadoj kaj ekskursoj en la ĉirkaŭaĵo.

Ĉiuvespere ni ĝuis diversajn kulturajn prezentadojn. La pentroarton de *Salvador Dalí* prezentis *Nina Korĵenevskaja* dimanĉe. *Raita Pyhälä* parolis pri Finnlando. *André Weber* bilde vizitigis al ni la urbon *Schwerin* en Germanio. *Marek Blahuš* skizis la historion de Ĉeĥio kaj parolis pri la universitata urbo Brno, kiu troviĝas en suda Moravio kaj kiu estas la dua plej granda urbo en Ĉeĥio. Proksime de Brno troviĝas la fame konata batalkampo *Austerlitz*. Ĉiujare en decembro sur la sama loko okazas spektaklo rememore al venko de Napoleono. *Dalia Pileckiene* prezentis la litovan lingvon, kiu ne similas al Esperanto, kiel iuj opiniis pro tio, ke Zamenhof loĝis ankaŭ en ŝia gepatra lando. Tre impresa kaj bone aranĝita estis la duhora bildprezento pri Vjetnamio de *Jean-François Cousineau*.

La lasta vespero, kiel kutime en ĉiuj E-aranĝoj konsistis el prezentadoj de ĉeestantoj. La kursanoj pretigis diversajn amuzajn skeĉojn, deklamon de poemo kaj estis sprite klarigitaj kelkaj konfuziloj. Ne mankis tombolo en kiu ĉiu gajnis ion. La vespero finiĝis per dankoj al la organizantoj kaj kurs-gvidantoj. Sekvis dancado akompane de akordiona muziko.



*Liba kaj Floreal Gabalda*

# La 7-a kongreso de Asocio de Esperantistoj-Handikapuloj en Moravio

Dum la semajnfino de 21.4. ĝis 23.4. ni renkontiĝis en nova ripozloko en Hodonín ĉe Kunštát.



Nia celo: elekti novajn membrojn de estraro. Grandnombre (60 personoj) ni grupiĝis en la destinita loko en Zámeček (Kasteleto) jam vendrede posttagmeze por interkonatiĝi kun aliaj samideanoj el nia lando.



Vespere ni ridis sekvante filmon *Konkero de la norda poluso*, teatraĵon de Zdeněk Svěrák. Antaŭparolon belege prezentis „aktoroj" de praga grupo E-mentalo, kiuj ankaŭ pretigis la sub-tekstojn de la filmo.

Sabate ni aŭskultis nian prezidantinon Lenka Angelová.

Ŝi sperte gvidis kunvenon kaj solvis ĉiujn punktojn de la programo. Ni ankaŭ tuŝis tiklan temon pri toleremo. Jes, ankaŭ la toleremo havas siajn limojn.



Tre diligente studis sian rolon Stanislava Hošková, kiu prezentis monologon pri Božena Němcová.

Posttagmeze ni vizitis la burgon Svojanov, kie ni frostis, ĉar en kavoj nia gvidantino rakontis al ni fabelojn pri antaŭa vivo de burgo.



Nia buso haltis ankaŭ en komunumo Olešnice, kie ni konatiĝis kun procedo de blua presado de ŝtofo. Preparitaj kudritaj varoj tre ĝojigis nin.

Bonan etoson ni ĝuis ankaŭ dum la dancvespero, muziko estis eminenta kaj ĉiuj dancis aŭ kantis.




Dimanĉe nian kunvenon daŭrigis prelegoj de Oldřich Fischer, Petro Chrdle (prezentita pere de Margit Turková).

Ni komune vizitis burgon Perštejn kaj nevole ni adiaŭis kun niaj geamikoj. La kongreso de handikapuloj finiĝis, nun sekvas la seminario pri la lingvo.

Jaroslava Malá,


Bavorov

# Konkero de la norda poluso



kun esperantlingvaj subtekstoj estis transdonita al Zdeněk Svěrák, kiu diris, ke estas bele, ke ekzistas homoj, kiuj dediĉas sin al tiu lingvo. La subtekstojn preparis ŝerculoj el skipo E-mentalo.

# Lingva seminario








sekvis tuj post la AEH-kongreso, ankaŭ en Hodonín apud Kunštát.

Partoprenis ĉirkaŭ 30 personoj, ankaŭ el Nederlando, Francio, Bulgario kaj Slovakio.

Antaŭtagmeze okazis lingva instruado en tri grupoj, posttagmeze ekskursoj kaj metiejo, vespere klerigaj kaj ripozigaj programoj.

*Pavla Dvořáková*

# Esperanta renkontiĝo en Česká Třebová



Ĉe la esperantista memorŝtono en la urba parko kunvenis (1.4.2017) esperantistoj el Č. Třebová, Praha, Žamberk, Pardubice kaj Prostějov, por memorigi gravan tagon de la Esperanto-movado. Gastis ankaŭ ĉinino  Li Huang el Pekino.



La prezidanto de EK rememoris ne nur la iniciatinton de la internacia lingvo L. L. Zamenhof,  sed ankaŭ historion de la loka rondeto "AMIKECO" kaj de ĝiaj membroj-fondintoj. La renkontiĝon daŭrigis prelego pri la komplika vivo kaj verkaro de Zamenhof. La partoprenantoj povis ankaŭ vidi la kompletigitan genealogion de la Zamenhof-familio. Intereson vekis ankaŭ fotodokumentoj el UK Nitra 2016 kaj rememoroj de la partoprenintoj de la kongreso. Kune kun ni ĉion sekvis ankaŭ la figuro de Zamenhof, kiun volonte pruntedonis la slovakaj amikoj kaj agrable ĉiujn surprizis.



Post informoj pri preparataj aranĝoj en la Esperanto-muzeo en Svitavy kaj en pluraj kluboj estis projekciata filmo "Patrino" kreita por video-konkurso en Ĉinio. Plaĉis ankaŭ filmo por IFEF-kongreso en Colmar (FR).




En neformala diskuto oni parolis pri alia aktivado de ĉeĥaj esperantistoj.


*Jana Křížková*

*fotis L. Dvořáková, L. Kovář, J. Liška, M. Minářová*

## Nova retejo de nia junularo

http://mladez.esperanto.cz/cs/




## Duolingo furoras




Al la Esperanto-kurso por anglalingvanoj starigita de Chuck Smith aliĝis jam 850 000 kursanoj ekde 28.5.2015. La saman kurson por hispanlingvanoj frekventas 120 000 kursanoj ekde 26.8.2016. La kurson finas 3% da kursanoj, tamen ĝi signifas, ke 30 000 novuloj sukcese finis la kurson.

www.duolingo.com/courses/all

## AMIKUMU




*Internacia teamo de esperantistoj evoluigis kaj en marto 2017 publikigis aplikaĵon AMIKUMU por plurfunkciaj poŝtelefonoj kaj tabledoj, kiu ebligas trovi kaj kontakti en proksimeco vivantajn parolantojn ne nur de Esperanto, sed ankaŭ de aliaj lingvoj, kies scipovon vi volas ekzerci. Elserĉado okazas laŭ la listo aŭ laŭ la mapo. Bazaj funkcioj estas senpagaj.*

**https://amikumu.com**

### LERNU!




Novan version de populara reta kurso **Lernu!** nun kun fantazia temo verkis Anna Löwenstein.

https://lernu.net/cs

# Pentraĵo pri Lidice al Ĉeĥio

Brita pentristo Stan Young antaŭ 60 jaroj pentris grandan pentraĵon pri la tragedio en Lidice. La bildon posedas patrino de esperantista verkistino Anna Löwenstein, kaj ŝi decidis donaci ĝin al la ĉeĥa nacio okaze de la 75-a datreveno de la tragedio. Anna Löwenstein kun sia edzo Renato Corsetti, iama UEA-prezidanto, estis invititaj veni al Lidice en septembro/oktobro por la ceremonia transdono de la pentraĵo.

La bildon kaj foton de la posedantoj kun nia ambadsadoro en Londono vi trovos en jenaj artikoloj
https://www.irozhlas.cz/kultura/do-ceska-z-londyna-zamiri-obraz-vyhlazeni-lidic-se-zpozdenim-temer-60-let_1705170700_haf
http://www.mzv.cz/london/cz/britska_rodina_venuje_ceske_republice.html

# Zamenhof en Kalendarium

La 8-an de aprilo 2017 Saskia Burešová en la televida programo Kalendarium, en kiu ŝi memorigas gravajn datrevenojn kaj ĉiam unu personon lasas kiel konkursan demandon, ĉifoje demandis, kiu estis homo, kiu naskiĝis en Bialistoko kaj kreis artefaritan lingvon, kiun li subskribis kiel D-ro Esperanto?

Respondon oni donis post semajno kaj ĝi estas legebla - ŝajne por ĉiam - en la televida retejo
www.ceskatelevize.cz/porady/1095927644-kalendarium/217562235300011/

# Ni kondolencas

■ La 18-an de aprilo 2017 forpasis en aĝo de 91 jaroj **Marie DVOŘÁKOVÁ** el Písek.
Laŭprofesie instruistino, ŝi esperantiĝis en 1966 de sia lernanto Radko, filo de la




tiama prezidanto de EK "La Ponto" s-ano Křivánek. Ekde 1969 fonda membro de ĈEA kaj aktiva membro de la klubo kaj de la katolika sekcio. Ĝis alta aĝo ŝi tenis admirindan psikan viglecon kaj ĝis 2016 partoprenadis la klubajn kaj sekciajn aranĝojn. Ni rememoras ŝian bonkorecon, helpemon kaj malavarecon.
-padv-



■ La 20-an de aprilo 2017 mortis **Bohumil Hodovský** (73j) el Dolní Kounice, iama instruanto en Lančov.

■ La 15-an de majo 2017 forpasis s-ino **Blanka Zubová** (1929-2017). Inter esperantistoj ŝi estis konata kiel pentristino.






Jen ŝia bildo de Penziono Espero en Skokovy.

## Forpasis Miroslav SMYČKA

En Startoj 2016/3 kaj 4 ni raportis pri la 90-jara jubileo de la emerita operkantisto kaj la honora membro de ĈEA Miroslav Smyčka. Bedaŭrinde ĉi-foje ni devas alporti tristan anoncon, ke la 25-an de aprilo 2017 li en sia familio en Prago silente forpasis.



M. Smyčka dum sia vivo prezentis baritonajn ĉefrolojn en multaj famaj operoj. Li esperantiĝis jam kiel studento en 1945 kaj kantis en granda kvanto da enlandaj kaj eksterlandaj Esperanto-aranĝoj, porokaze ankaŭ prelegis aŭ verkis artikolojn. Nepre aprezindaj estas de li organizitaj kulturaj festivaloj en Ústí n. L., kies klubon li gvidis. Post transloĝiĝo al České Budějovice en 2005 li membriĝis en EK Písek. En tiu etapo komenciĝis ankaŭ realigo de liaj muzikaj kaj literaturaj registraĵoj, por ke lia arto konserviĝu ankaŭ por la estonto. La aktualigitan liston de la registraĵoj disponeblaj interrete kaj spektindan videon el lia naskiĝtaga rememorprogramo en Prago vi trovos en Aktualaĵoj en esperanto.cz.

Laŭ esprimo de lia filino Jolana, lia amo ne nur al muziko, sed ankaŭ al Esperanto, kiun li perfekte regis, kaj amikecoj en la esperantista komunumo sendube kontribuis al tio, ke ĝis la lastaj tagoj li konservis nekutiman fizikan kaj mensan freŝecon kaj artajn kapablojn sur alta nivelo.

Neforgesebla estas lia lasta publika kanto, la muzikala kanto "Mississippi" prezentita kadre de la ĈEA-Kongreso en Pelhřimov. - Ĉ. duonon de la partoprenantoj de la lasta adiaŭo en la preĝejo en Prago-Lhotka konsistigis esperantistoj. Laŭdezire de la familio li estis memorigita kun la verda flago, eksonis ankaŭ adiaŭo nome de esperantistoj, parte ankaŭ en la lingvo mem, kaj dum la sekva neformala babilado estis aŭdigita ankaŭ lia voĉo en Esperanto - krom "Largo" de Dvořák (kun la teksto de J. Kořínek) kaj lia amata "Lulkanto" de Smetana ankaŭ "Maljuna arbo" el Interparoloj kun T. G. Masaryk, kiu trafe esprimis lian propran opinion pri la arto de aktiva maljuniĝado kaj de sencohava vivado, de kiu ni ĉiuj prenu inspiron. En niaj rememoroj kaj dank' al sia bela voĉo li certe plu restados inter ni.

-padv-



*surfote el la lasta adiaŭo:*
*en unu el siaj roloj - Kalina*
*en la opero "Sekreto" de Smetana*

# Ni gratulas

al samideanoj, kiuj ĉi-sezone festas gravajn vivjubileojn:

**Bohumíra Baierová**, Strakonice
**Jaroslav Benda**, Most
**Ladislav Částečka**, Lipník nad Bečvou
**Vladimír Forejt**, Chomutov
**Helena Hillebrandová**, Rychnov u Jablonce
**Zdenka Horáková**, Slavičín
**Josef Hosa**, Havířov
**Alois Jakubec**, Hranice
**Blanka Hužerová**, Mladá Boleslav
**Mgr. Jana Kaucová**, Ostrožská Lhota
**Mária Kráčmarová**, Hořice v Podkrkonoší
**Ing. Jaroslav Krolupper**, CSc., Praha
**Radka Křivánková**, Písek
**Ivana Kubová**, Dřevohostice
**Miroslav Majerský**, Nové Město nad Metují
**Ing. Stanislav Nedělka**, Hradec Králové
**Milada Petráčková**, Neratovice
**Jaroslav Pokorný**, Česká Rybná
**Tomáš Polnický**, Poděbrady
**Ivan Potiška**, Hranice na Moravě
**Ing. Hana Rolencová**, Třemošná u Plzně
**Ing. Radim Surý**, Hnojník
**Ing. Vladimír Šilhán**, Praha
**Josef Šimberský**, Chleny
**Václav Vanc**, Ústí nad Labem
**Jiří Vaníček**,Chrudim

# RNDr. Josef Kavka - 95

Honora membro de ĈEA, ISAE kaj UEA ĝisvivas eviindan aĝon de 95 jaroj. Li estas konata kiel multjara redaktoro de Scienca Revuo kaj Geologio internacia kaj aŭtoro de centoj da fakaj artikoloj, pri kiuj ni jam plurfoje skribis.

## František Kožík

(1909-1997)

Eminenta verkisto de historiaj romanoj kaj membro de la aktora grupo TRAKT ĉe la intermilita Verda Stacio en Brno, do amiko de Esperanto, forpasis antaŭ 20 jaroj. Apud la opereto *Sur rozoj sternite* aperis en Esperanto el liaj verkoj *Lumo en tenebro* (pri Komenio), antologieto el liaj romanoj *Poeto ne mortas* kaj kiel bitlibro *La plej eminenta inter pierotoj* (pri Debureau). En manuskripto ekzistas romano *Super la valoj mateniĝas*. Liaj romanoj estas kutime biografioj de famuloj (Camoes, Cervantes, de Sade, Janáček, Karolo la Kvara, Mánes, Tyl, Čermák, Braunerová, Vojan, Těsnohlídek).

## Jaroslav Mařík

(1913-1997)



Unu monaton post F. Kožík forlasis nin ankaŭ J. Mařík, honora membro de ĈEA kaj UEA. Li ellernis unue Esperantidon (16-jara) kaj nur poste Esperanton (21-jara), kiel 26-jara li fariĝis estro de la asocia Gazetara Servo. Post la milito li laboris kiel ĝenerala sekretario de EAĈSR kaj parolisto de Verda Stacio. Tiutempe li esperantigis politikajn broŝurojn *Konstitucio de Ĉeĥoslovaka Respubliko* kaj *Lerneja reformo en Ĉeĥoslovakio*. Post likvido de la asocio li fariĝis ĉefdelegito de junularo. Lia plej granda merito estis fondo de ĈEA en 1969, estis ĝuste li, kiu kiel membro de preparkomitato subskribis necesajn dokumentojn en ministerio.

# Kluba vivo

**Prostějov:** La 15-an de aprilo 2017 skolta grupo de 8 membroj ekskursis al Záhoří, kie ili plenumis diversajn taskojn, rostis fumaĵitan viandon kaj ludis diversajn ludojn.



**Vítkovice:** La 17-an de majo 2017 la klubo efektivigis sian tradician ovofritaĵon, ĉi-foje en Frýdlant kaj pro malbona vetero en domo.



**Písek:** La 19-an de de majo 2017 okazis jarkunveno de la klubo *"La Ponto"*.

Ĝi okazis post pli ol dek jaroj denove en la pastra hejmo Petrinum, kien sukcesis retransloĝiĝi el České Budějovice Josef KOBZA, do la aranĝo okazis ankaŭ omaĝe al lia rebonvenigo en lia antaŭa hejmurbo.

El la aktivecoj de la klubo - ekz. rilate nerektan reklamon por Esperanto - ĉiloke porinspire menciindas ekz. Adventa Matineo, okazigita jam 8foje por la publiko en la Urba Biblioteko, kie Esperanto ludas nur akompanan rolon. La klubo alŝutis en 2016 12 novajn ekskursajn fotogaleriojn kaj 13 videojn el kulturaj aranĝoj en la regiono, kiuj estas priskribataj paralele ĉeĥe kaj Esperante kaj tiel la lingvon multaj povas renkonti eĉ necelite.

Sablo.rajce.idnes.cz nun entenas pli ol 90 albumojn kaj havas pli ol 5000 vizitojn. Prezidanto de la klubo plu restas Pavla Dvořáková. Dato de la plua AnkRo, al kiu ĉiuj estas bonvenaj, estis fiksita por la 9-a de decembro.



Dum la renkontiĝo oni ankaŭ rememoris la ĵus forpasintajn membrojn M. Dvořáková kaj M. Smyčka kaj solenis vivjubileon de la honora prezidantino Radka KŘIVÁNKOVÁ, do fine ne rajtis manki ankaŭ kantado kun gitaro.

-padv-

# Jak platit svazu

### Fio banka Svitavy

Platit lze poštovní poukázkou A (poplatek 22 Kč do 5000 Kč) nebo převodem na účet **2800186228/2010**, **variabilní symbol** má celkem 10 míst - prvních pět je pro vaše číslo svazové legitimace (bez písmene kategorie a doplněné vpředu nulami, např. 00325). Číslo legitimace je uvedeno na štítku při expedici Starta. Dalších pět míst pro variabilní symbol podle účelu platby (viz seznam). Pokud platíte za klub (EK nebo sekci), uveďte své číslo legitimace a pošlete na emailovou adresu Vr. Hirše seznam, za koho platíte.

Seznam čísel:
(ukončení variabilního symbolu)

**06940** členství ČES
**06941** členství UEA
**06942** předplatné Starta bez členství
**06943** dary ČES a mimořádné čl. příspěvky
**06944** poplatek UK
**06945** kongres EEU
**50400** komise pedagogická ILEI
**50401** písemný kurs začátečníci
**50402** písemný kurs pokročilí
**50404** Paroliga kurso
**50405** svazové zkoušky
**50800** sekce nevidomých LIBE
**50900** sekce zdravotníků UMEA
**51000** sekce křesť. esp. KELI,
vlastní b. ú. 211 768 239/0300
**51100** sekce katol. esp. IKUE,
vlastní b. ú. 2700247564/2010
**51200** sekce informatiky
**70100** komise pro tisk a inf.
**80200** ediční fond
**80300** propagace v tisku
**80400** fond Tilio
**80500** virtuální *adresa@esperanto.cz*

# Internetové stránky o Zamenhofovi i v češtině




Organizace Edukace@Internet zpracovala mnohojazyčnou stránku o Zamenhofovi a jeho díle, českou verzi vytvořil Petr Diblík, najdete ji na adrese

http://zamenhof.info/cs/

Najdete zde životopis i fotogalerii Zamenhofových, Zamenhofova díla volně dostupná na internetu apod.




Jinou stránku vytvořila organizace www.esperanto.net také v mnoha jazycích, do češtiny přeložil Miroslav Malovec. Je zde 31 článků týkajících se Zamenhofova života a díla.

Obě stránky existují i v dalších jazycích, samozřejmě i v esperantu, které zde slouží jako pilotní jazyk, ze kterého vznikají další jazykové verze.

*mm*

**Periodikum Českého esperantského svazu, z.s.**
**48. ročník**

**Redaktor: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

**starto@esperanto.cz**
**http://www.esperanto.cz/starto**

**Předplatné v Česku (bez členství ve svazu): 200 Kč**

**Členská evidence a změny adres:**

**p/a Vratislav Hirš, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, vratislav.hirs@esperanto.cz, tel. 517 444 117**
**Uzávěrka příštího čísla**: 15.8.2017

---------------------------------------------
-

**Organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio**
**48-a jarkolekto**

**Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ rekte ĉe nia Asocio**

**Abonprezo: 11 eŭroj, ekster Eŭropo 13 eŭroj**

**(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)**

**elektronika versio PDF 6 eŭroj**

**Redaktoro: Miroslav Malovec,**

**Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

**Ĉeĥio, starto@esperanto.cz**

**http://www.esperanto.cz/starto**

**Presis: DTP centrum, Svitavy**

**Redakto-fermo de la sekva numero**: 15.8.2017

**ISSN 1212-009X**

**Redakto-fermoj: 1.2.; 7.5.; 15.8.; 15.11.**

# KALENDARO 2017

**2017-04-01** Regiona renkontiĝo en Česká Třebová Info: jk.esperanto@seznam.cz
**2017-04-21/28** Internacia Kongreso de AEH kun lingva seminario en Hodonín ĉe Kunštát
Info: aeh@esperanto-aeh.eu
**2017-04-28-05/01** 4-a CENTREJO Bartošovice
Info http://centrejo.esperanto.cz/
**2017-05-20** Printempa Renkontiĝo en Šumperk
Info: sumperk@esperanto.cz
**2017-06-09/11** Muzea nokto kaj inaŭguro de la nova ekspozicio en Svitavy
Info: muzeo@esperanto.cz
**2017-06-18** Ĉantorio
Info: suchanekj@seznam.cz
**2017-07-16/29** SET Lančov 2
**2017-07-30/08-11** SET Lančov 3
**2017-08-11/13** Renkonto de eksaj tendaranoj – jubilea, la 20a! en Lančov
Info: let.lancov@seznam.cz
**2017-09-07/10** Skokovy
Info: drahotova@esperanto.cz tel. 720652320
**2017-09-22/28** Renkontiĝo en Svitavy
Info: verdastacio@gmail.com
**2017-10-13/15** ĈEA-Konferenco en Kroměříž
Info: komitato@esperanto.cz
**2017-12-09** ANKRO Písek
Info: pisek@esperanto.cz
**2017-12-10** Marcipana Kristnasko
Info: svitavy@esperanto.cz

**ARANĜOJ EN NAJBARAJ LANDOJ**
**2017-05-12/14** 36-a Pola E-Kongreso en Bjalistoko
Info:polaj-esperantistoj@yahoogroups.com
**2017-05-16/22** 69a IFEF-kongreso en Colmar, Francio, Info: http://ifef.free.fr
**2017-05-18/21** Interkultura Majrenedevuo en Vroclavo
Info:informado.eo@gmail.com
2017-05-19/21 Tutslovakia E-Renkontiĝo en Partizánske
Info:skef@esperanto.sk
2017-06-2/5 Germana E-Kongreso kaj EEU-Kongreso en Freiburg
www.esperanto.de/dek2017
**2017-08-07/14** KELI-kongreso Zöblitz, Germanio
Info: polnickypavel@seznam.cz



Zdeněk Svěrák kun niaj E-mentalanoj post akcepto de esperantlingvaj subtekstoj por lia filmo *Konkreo de norda poluso*



Ĉe la memorŝtono en la urba parko en Česká Třebová



Ovofritaĵo en Frýdlant




Partoprenantoj de la Lingva Seminario dum la ekskurso en Rudka kun la ĉeĥa leono antaŭ la Groto de la kavaliroj de Blaník



KE Brno finis la sezonon per renkonto en la ĝardeno de s-ino Veselá



Dudekjara kanada studento Donovan Downes en Svitavy